En iu tre antikva libro, kiun la islamaj teologoj kaj ĉiam pli multaj eŭropaj »liberpensantoj« proklamas en multaj aspektoj falsita, kvankam neniu el ili antaŭmetis ĝis nun la supozitan nefalsitan originalon, laŭ kiu oni povus laŭ la serioza baza scienco principo demaskigi la falsaĵojn, mi legis pri kongreso de la plej aŭtentaj – jes, oni povas diri esperantistoj, kvankam ili tiam estis nomitaj ĉefe »La Vojo« – en la multe pli frua tempo ol tiu de Bulonjo kaj eĉ ekster la eŭropa teritorio kaj sub la cirkonstancoj de la okupiteco, kiu estis multe pli malfacila kaj kruda, ol estis ekzemple la mallongtempa okupiteco de Francio fare de la germana nazia regno.

Tie mi legis tekston, kiu min konvinkis, ke la vere unua universala kongreso de ESPERANTOJ, kiel la unuaj parolantoj de la idiomo de Zamenhof sin pli

adekvate nomis, ja Zamenhof mem ne subskribis sian unuan libron kiel d-ro Esperantisto, sed kiel d-ro Esperanto, okazis proksimume en la 33-a jaro post la naskiĝo de Jesuo, en la tempo de *šauvot*, de la juda pentekosto, ne en tiu aŭ tiu palaco aŭ eĉ en la templo, nove konstruita de la pajla, sed sur la stratoj de Jerusalemo la evento, kiu faras kaj markas la plej gravan historian limon inter la Malnova kaj Nova epokoj kaj testamentoj. La teksto diras tion ĉi:

»Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unuanime en unu loko. Kaj subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili sidis. Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon. Kaj en Jerusalem tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo. Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia: Rigardu! Ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? Kiel do ni aŭdas ĉiujn en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj de Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio. Frigio kaj Pamfilio, Egipto kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj, la mrindajojn de Dio. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj embarasiĝis, dirante unu al alia: Kion ĉi tio signifas? Sed aliaj moke diris: Ili estas plenaj de mosto. Sed Petro, stariginte kun la dek unu, levis sian vocon kaj parolis al ili, dirante: Ho Judoj kaj ĉiuj loĝantoj en Jerusalem, ĉi tio estu al vi sciata, kaj aŭskultu miajn vortojn. Ĉar ĉi tiuj ne estas ebriaj, kiel vi supozas, ĉar estas la tria horo de la tago; sed jen tio, kio estis dirita per la profeto Joel: Kaj en la lasta tempo, diras Dio, Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiujn karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetas, kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn; kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian spiriton, kaj ili profetas. Kaj Mi donos miraklojn en la ĉielo supre, kaj signojn sur la tero malsupre: sangon, fajron, kaj vaporon de fumo; la suno fariĝos malluma, kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ ol venos la granda kaj majesta tago de la Eternulo; kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos« (Agoj 2,1-21).

Do, ni resumu, kio fakte okazis! Mi vidas tri eventojn en kombino. Unue la spirito de Dio venis en la dudekon de apostoloj, do tiuj disciploj, kiuj estis de Jesuo senditaj peri la mesaĝon, la »bonan mesaĝon«, kion la greka vorto *euangelion* signifas, al la judoj kaj en la tutan mondon. Ili ĝis tiu momento ne troviĝis sur

la nivelo de tiu ekstraordinara senditeco, sed sin fermis kaj kaŝis por esti protektitaj antaŭ la juda popolo kaj same antaŭ la romia okupatoro. Ili ne ricevis jam la promesitan Dian spiriton, tial ili ne povis sekvi la instigon de ilia Majstro: Ne timu! sed pli ol timis kaj atendis evoluon de la eventoj. Sed tuj post la alveno de la Dia spirito, ilia karaktero ĉesis esti animeca, kiel antaŭe, kondukanta laŭ la karno kaj homa naturo, sed iĝis spirita, kondukita de la Dia spirito, tial sentima. Kaj ili desupre ricevis ankaŭ apartan donacon en formo de mirakla kapablo paroli en lingvoj, kiujn ili ne akiris per longtempa kaj peniga lernado, sed subite, rekte de la Sankta Spirito. Kaj ĉi tie oni devas fari pripensan paŭzon, ankaŭ mi ĝin faris. Dio povis procedi laŭ la logiko kaj tradicio de la mondo kaj utiligi la tiam plej fortan lingvon, la »anglan« de tiu tempo, la latinan, kiun verŝajne ĉiuj almenaŭ komprenis, kiel ekzemple ĉiuj slovenoj ek de la komenco de la bajuvara superpovo, komprenis kaj parolis ankaŭ la germanan lingvon; kiel la slovenoj sub la domino de la serba superpovo en la tempo de ambaŭ jugoslaviaj ŝtatoj komprenis kaj parolis la serb-kroatan lingvon, kaj kiel ĉiam pli multaj slovenoj nuntempe sub la superpovo, do mem elektita okupacio formale el Bruselo, fakte el Berlino, komprenas kaj parolas la anglan, tiel ankaŭ la de la romianoj okupitaj judoj certe pli malpli komprenis kaj parolis la latinan. Sed Dio ne kondutis tiel, kiel kondutas la nacioj kaj iliaj regnantoj ĝis niaj tagoj, Li ne elektis la latinan. Dio povus utiligi la altan antikvan grekan lingvon de Platono kaj Aristotelo, de Demosteno, Ajshilo kaj Sofoklo kaj aliaj grekaj granduloj, ja la greka tiutempe estis la plej renoma lingvo de granda literaturo, retorika arto, teatro kaj scienco, iel la franca de tiu tempo. Dio ankaŭ la noblan grekan lingvon ne elektis. Dio povus procedi kiel pli poste procedis la katolika eklezio de Romo, kiu por la ekleziaj bezonoj prenis la lingvon de la Romia imperio, la latinan, kiun la simpla popolo ne plu komprenis kaj ne plu parolis, kaj utiligi la jam delonge mortan hebrean lingvon, kiu funkciis nur plu en la templo kaj en unuopaj sinagogoj por ritaj celoj. Dio ankaŭ tion ne faris. Li la unuan fojon post la babela katastrofo, per kiu ankaŭ finiĝis la glora tempo, dum kiu la tuta mondo parolis unu nuran lingvon: »Sur la tutu tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero« (1 Mos 11,1), sian rimedon kontraŭ la peko de Babelo dum unu tago, dum tiu pentekosta tago en Jerusalemo, suspendis kaj egaligis ĉiujn lingvojn sen iun ajn privilegii kaj aliajn malprivilegii. Tiel la apostoloj predikis puran evangelion kaj ne apud la evangelio ankaŭ iomete da romia juro, apud la evangelio iomete da greka filozofio, apud la evangelio iomete da juda tradicio, apud la araba iomete da hagarisma ĵaluzeco,

daŭranta ĝis niaj tagoj ktp. Dio volis, ke en la vera komenco de la kristana epoko estu predikata pura evangelio sen iu ajn nacieca, kulturtipa, historispecifa, religitipa ktp. kromfonto, donita per tiu aŭ tiu etna aŭ nacia lingvo. Ĉu ne estas tio ankaŭ la baza principio de la Lingvo Internacia de Zamenhof, mem judo, kvankam de propraj disiciploj tiom longe en tiu specifo prislentita? Tiu Dia metodo kaj procedo jam faras duonon da tio, kion ni nun prenas por la esenco de la fenomeno »Esperanto«.

Sed eĉ pli grava elemento ol la elektado de la lingva regîmo, estas la karaktero de la predigita enhavo, ĝia ŝlosila nocio. Kion predikis Petro kaj aliaj apostoloj? Tion diras la lasta supre citita diro de Petro, sed kompreneble lia tuta prediko: »*kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos*« (Agjo 2,21).

Kiel nomiĝas la sapiro de ĉiu homo, kies plenumon la apostolo ĉi tie, portita de la Dia spirito, promesas? Ĉu tio ne estas, klare, la ESPERO? Kompreneble. Estas la sama espero, pri kiu parolas apostolo Paŭlo: »*Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo*« (1 Kor 13,13).

Laŭ tiuj ĉi vortoj ĉiu vera kristano estas tiu, kiu vere fidas, kiu vere esperas, kiu vere amas. Se vere fidas, do fidanto; se vere esperas, do **esperanto**; se vere amas, do amanto. Mi ne povas kredi, ke Zamenhof tiujn tri bazajn nociojn kaj kriteriojn de la kristana kredo estus uzinta facilanime kaj tiel ridinde false, ke li sub »fidik komprenus blindan naivecon, kiu kredas ĉion, kion la homoj al li diras; ke li sub »esperi« komprenus banalan kaj materiisman atendon je bona salajro, bona kaj renoma laborloko kaj alta posteniĝo en la ŝtato; kaj ke li sub »ami« komprenus la pervertigon de tiu esprimo, ne sciante, ke la greka lingvo havas minimume kvar diversajn vortojn por diversaj aspektoj kaj kvalitoj de la amo, kaj ke la evangelio ne parolas ekzemple pri *eros* (sekса inklino), sed pri *agape* (amo kiel preteco trakti alian homon laŭ la maniero de Jesuo), kiel antaŭ nelonge iu min demandis, kiomaniere Dio povas malpermesi amon inter viro kaj viro aŭ virino kaj virino, nome en la senco de pederastio kaj lesboco, se Li samtempe la amon ordonas... Nu, ni vivas en malopportunaj tempoj koncerne komprenon de spiritaj nocioj. Vera esperanto tiel povas esti ne ĉiu, kiu parolas Esperanton, ja ankaŭ multaj naziaj kaj sovetiaj sekret-policistoj bone parolis Esperanton por povi persekuti la esperantistojn kaj ilin poste enketi, sed nur tiu, kiu havas veran spirite konceptitan kaj alprenitan esperon, kian la Sankta Spirito al la homo nur povas doni kaj nur tiu, kiu samtempe vere kredas, nome laŭ la Skribo, kaj vere amas, nome laŭ la modelo de Jesuo,

povas ankaŭ vere esperi, nome laŭ la maniero de la apostoloj, plenigitaj de la Sankta Spirito.

Tial mi estas ĝoja, ke mi ne bezonas esti »esperantisto«, ja tio klare montras, ke ne temas pri la homo de vera, spirita espero el la Dia spirito, sed pri ekstereca membreco kaj aparteno, ĉu je nivelo hobia, ideologia, lingve entuziasma, eble eĉ iomete morale motivita en la senco de »komunika justeco« – kaj ke oni povas esti ankaŭ **esperanto**, kiel Zamenhof sin mem identigis kaj subskribis: homo, kiu vere havas fidon, kiu vere havas esperon, kiu vere havas amon, ne karnan, sed spiritan, Die spiritan.

Tiel la unua universalala kongreso de esperantistoj certe okazis en la jaro 1905 en Bulonjo, sed la unua universalala kongreso de la **esperantoj** same certe okazis en la pentekosta tago en Jerusalemo 50 tagojn post la juda paska festo, antaŭ kiu nia Savonto estis krucumita kaj dum kiu li post tri tagoj estis elprenita el la morto.

Kion tio konkrete signifas por la nuna situacio de la Lingvo Internacia de Zamenhof? La plej malbona servo al la spirita flanko de Esperanto, nome spirita laŭ la senco de la pentekosta tago kaj miraklo en Jerusalemo antaŭ preskaŭ 2000 jaroj, estus formi du zamenhofeskajn popolojn kaj peli ilin al konkurado, kiu sub certaj kondiĉoj eĉ povus pervertigi kiel interbatalo. Ja tio tiom foje okazis inter la religioj, inter la similaj ideologioj kaj ene de la sama nacianalismo.

Se esperantistoj bezonas organizajn strukturojn, organojn, hierarkion, buĝeton kaj simile, la esperantoj bezonas nur fidelan, konsekvencan vivon laŭ siaj tri ŝlosilaj nocioj: fido, espero, amo. Se esperantisto la lingvon de Zamenhof prefere propagandas, la esperanto ĝin profunde lernas kaj uzas por la plej noblaj kaj unuaj celoj de ĉiu homa lingvo: glori la Eternulon kaj efektivigi amon al la proksimulo. Se esperantistoj konceptas riĉajn programviziojn (kutime neniam realigitajn), arkivigas elcerpanj protokolojn, la esperantoj verkas en tiu lingvo bonajn verkojn kaj tradukas tiajn el la trezoroj de la naciaj literaturoj, kaj inverse. Se esperantistoj estas markitaj per standardoj, okulfrapaj signopingloj, koloraj surskriboj, himno, sloganoj, la esperantoj estas markitaj per sia sinteno, nobla kaj altruisma traktado de aliaj homoj kaj rezigno pri propraj interesoj koncerne la uzon de la Lingvo Internacia. Se esperantistoj daŭre kalkulas, kiomaj ili estas kaj eĉ provas blufi la publikon per nerealaj asertoj, la esperantoj sin kontrolas, kiaj ili estas en la senco de sia lingva elektado: morale, kvalite kaj por la aliaj utila. Se esperantistoj blufas la publikon per troigaj asertoj, kiel facila, kiel logika ilia lingvo estas, kiel larĝe ĝi estas

disvastigita kaj simile, la esperantoj diras al la eventualej interesitoj puran veron: Esperanto estas je nivelo de infanĝardeno multe pli facila ol aliaj lingvoj; je la nivelo de la sukcese finita elementa lernejo ĝi estas nur plu iomete pli facila; je la nivelo de maturekzameno ĝi estas same malfacila kiel ilia gepatra aŭ iu meze malfacila fremda lingvo; kaj je la nivelo de akademio titolo ĝi estas pli malfacila ol la nacia aŭ etna lingvo. Sufiĉas mencii problemon de la artikolo, aparte ĉe la slavaj popoloj. Sufiĉas mencii problemon de la transitivaj kaj netransitivaj verboj ktp.

Se esperantistoj daŭre luliĝas en ideologaj iluzioj, ke ĝenerala enkonduko de Esperanto, la »fina venko« farus nian mondron esence pli justan, pacan, agrablan kaj feliĉan, la esperantoj parolas veron, ke tiu ĉi mondo nek veran pacon, nek veran justecon, nek veran feliĉon povas doni aŭ eĉ garantii. Kiom da plej kruelaj militoj okazas ene de la sama lingvo! Estas nia bonšanco, ke Esperanto ne atingis la revatan »finan venkon«, ĉar estus vera ŝoko, kiam spite tian sukceson eksplodus la unua milito inter du ŝtatoj, kies civitanoj ambaŭflanke bone parolus la saman komunan lingvon. Dum la 30-jara milito (1618-1648) ne troviĝis lingvaj problemoj. Pliparte interbatalis germane parolintaj armeoj kaj taĉmentoj, la edukitaj homoj havis ankoraŭ komunan tuteŭropian latinan lingvon. Dum la 3-a balkana milito (1989-1996) ĉiuj flankoj parolis praktike la saman lingvon, kaj tio la kruelecon ne reduktis, sed ĝin ĝuste fortigis. Unu el la plej kruelaj intercivitanaj militoj, tiu de Usono (1861-1865), okazis helpe de la sama angla lingvo ĉe ambaŭ batalantaj flankoj, tiu de la Nordo (Uniistoj sub Lincoln) kaj tiu de la Sudo (Konfederacistoj sub Davis). Konante la veran homan naturon la esperantoj restas realismaj observantoj kaj ne bedaŭras multe, ke la plimulto de la homaro ne disponas pri komuna lingvo, ja tiu nur pli helpus la malbonon, troviĝantan en la koroj de la granda plimulto.

Tia enkonduko estis bezonita por povi tamen gaje rememori la bonan faron de la serba esperantisto, kiu laŭ la donitaĵoj al ni konataj, estis ankaŭ vera esperanto. Li verkis enhave riĉan kaj stile elegantan romanon, sen demandi, kiu kiam ĝin eldonos. La unua eldono aperis nur 20 jarojn post lia morto, do en la jaro 1959 en Belgrado. Kaj la slovenoj povas legi pri sia loko kaj cirkonstancoj ankaŭ la dua mondumilito nur dudek jarojn kaj pli post la disfalo de Jugoslavuo. Živanović ne zorgis multe pri tio, li estis ankaŭ esperanto, ne nur esperantisto. Li estis spirite vekita homo. Herooj en lia romano interparolas pri arto, pri religia kredo, pri moralaj dilemoj.

Kaj tiu modesta medicinisto kaj verkisto, sen ajna literateska pozo, kiel nuntempe preskaŭ deviga, post sia reveno al Belgrado denove paſis en laboreteamon kun sloveno d-ro Jakob Stefančič, naskita kiel karintia sloveno en Vilako, diplomita pri juro en la universitato de Prago, militkapitita dum la unua milito de la rusoj, libervole aliĝinta al la korpuso de slovenaj soldatoj batalontaj flanke de la Reĝlando Serbujo. Tiu Stefančič jam antaŭ la milito lernis Esperanton. Post siaj militstaj aventuroj li fariĝis sindikata organizanto en Belgrado kaj fekunda esperanta redaktoro, tradukisto kaj verkisto. Interalie li en versoj tradukis la novelon de Cankar *Servisto Bartolomeo kaj lia rajto* en Esperanton. Japanoj el Esperanto la samon tradukis en sian lingvon. Kiam ambaŭ graduloj, la serbo Živanović kaj la sloveno Stefančič renkontiĝis, Serbujo fariĝis grandpotenco de esperanta vivo kaj laboro. Ili kunredaktis la renoman kulturrevuon de jugoslaviaj esperantaj aŭtoroj La Suda Stelo, kiu aperadis ankaŭ post la dua milito ĝis la 80-aj jaroj, kiam la konstruŝraŭboj de Jugoslavio post la morto de Broz evidente malsolidiĝis. Unu el fortaj perdintoj de la disfalo estis ankaŭ la movado por la internacia lingvo. Nur etaj postrestaĵoj de la iama mirinda jugoslavia movado restis ĝis nia tempo. Esperantistoj en Jugoslavio ne komprendis, ke la idealisma promeso de la komunista konferenco en Vukovar 1920, kie oni parolas pri Esperanto kiel lingvo de la proletarioj, kaj kuriozaĵo, ke la aŭtokrato Broz en la malliberejo de Maribor antaŭ la dua milito lernis Esperanton, ne povas garantii daŭran prosperon de la internacia lingvo. Kun la komunisma régimo kaj ĝia dinasta estro mortis ankaŭ la granda parto de la movado, kiu konstruis en la sablo de la pasebla politiko anstataŭ sur la firma roko de la Dia vorto, pri kiu Jesuo parolis.

Tamen, tiuj du viroj estis enkorpiĝo de miniatura bona Jugoslavio. Sed ili estis ankaŭ esperantoj, ne nur esperantistoj! Ili ne kulpigis la francan lingvon, kiel la nunaj esperantistoj kulpigas la anglan, ke ili mem ne prosperas. Ili ne serĉis helpon kaj savon ĉe la reĝa kortego, kiel la nur esperantistoj poste tion serĉis ĉe la komunisma nomenklaturo en la samaj konfiskitaj kortegoj. Ili ambaŭ per sia laboro kaj sinteno ankaŭ la nunan generacion povas instrui, kiel la prudenta masonisto pli bone laboras. Ne masoni en la sablon, sed sur la rokon.

Ne fari kompromisojn kun vero kaj justeco por tiel eventuale meriti bonan reputacion ĉe la tiranoj.

Esperantisto kontraŭbatalas la anglan – la esperanto la anglan pli bone lernas ol la oponantoj de Esperanto kaj tiel pruvas la avantaĝon de ĝi.

Ĉu Dio solvis la lingvan problemon en Jerusalemo nur por tiu unu tago? Ne. La unua kristanoj ricevis sian tiaman »Esperanton«, kies lingva nomo estis *koiné* – la greka ή κοινή διάλεκτος *hē koinē diálektos* signifas simple »la ĝeneralaj dialektoj«. La grekaj ŝtatoj ne plu troviĝis, ja la Romia imperio okupis ankaŭ la grekajn landojn, kaj tiu simpligita, popola, ne akademia, sed en la tuta Mediteraneo kaj Antaŭazio disvastigita lingvo unuflanke estis nacie kaj politike neŭtrala, aliflanke jam elprovita per la traduko de *Septuaginto*, la koine-greka traduko de *Tanakh*, kiel la hebrea nomas la librojn de la Malnova Testamento. Tiel ne nur la Nova Testamento estis tradukita en tiam neŭtralan kaj ĝenerale konatan lingvon, do Esperanton de tiu epoko, sed ankaŭ la unua generacioj de kristanoj havis sian »Esperanton« en la formo de tiu koineo senrigarde sian etnan kaj lingvan apartenon.

Ĉu nunaj kristanoj ricevos bezonatan lumradion por rekonji en Esperanto de Zamenhof idealan anstataŭon de la antikva koineo, ke ili ankaŭ en la lasta parto de la homa historio antaŭ la alveno de Kristo povus havi komunan lingvon kaj tiel pli intense vivi ankaŭ la universalan (katolikan, sed ne rom-katolikan) aspekton de la vera eklezio de Jesuo, estas grava temo de la esperantoj, kiuj jam uzas sian lingvon por disvasti la evangelion – kaj ĉu la esperantoj ricevos la saman evidon kaj alprenos ankaŭ la veran kernan enhavon de tia nova koineo, kiu ne povas esti io alia ol la vorto de Dio, tio estas same grava temo de veraj esperantoj. Masoni sur la roko kaj esperi en la senco de la fido por povi ami kiel Dio amas, tio faras la fermitan cirklon de vera dieca komunikado. Se esperantistoj ne fariĝos ankaŭ kaj antaŭ ĉio veraj esperantoj, ĉio restos vantajo, deponita en la Internacia muzeo en Vieno, jen ĉi...

Obvestila in vabilia

Informoj kaj invitoj

Tečaj na OŠ Antona Ukmarpa v Kopru

V letošnjem šolskem letu 2018/2019 je tečaj esperanta na OŠ Antona Ukmarpa Koper redno obiskovalo deset učencev od 6. do 9. razreda. Mentor je bil Peter Grbec. Tečaj je bil v obliku interesne dejavnosti, kar pomeni, da je bil neobvezen. Interesna dejavnost esperanto je potekala eno uro tedensko. Učencii so se učili esperanta s pomočjo aplikacije Duolingo ter s pomočjo direktne metode slovaškega avtorja Staneta Marčka.

Vrhunec letošnje interesne dejavnosti *Esperanto* je bil obisk 43 francoskih vrstnikov iz kraja Salins-Les-Bains iz Francije, ki se prav tako prostovoljno učijo esperanta. Učencii so se že pred prihodom spoznali preko skypa in se v Sloveniji bolj ali manj uspešno pogovarjali v esperantu in tako še v živo spoznavali vlogo esperanta, kot jezik, ki je še posebej primeren za mednarodno sporazumevanje. Dogodek je bil odmeven v šolskem prostoru in tudi izven, saj je o dogodku poročal tudi Radio Koper. **P.G.**

Tečaj v Medgeneracijskem centru v Izoli

Konec junija 2019 smo v Medgeneracijskem centru v Izoli zaključili prvi trimesečni brezplačni tečaj esperanta. Tečaj je potekal dve uri tedensko in ga je redno obiskovalo pet tečajnikov. Imeli smo se lepo. Pouk je potekal po direktni metodi, ki jo je napisal Slovak Stano Marček. Tečaj poteka v organizaciji Združenja za esperanto Slovenije. Namen tečaja je bil navdušiti mlajše upokojence za učenje esperanta in se udeležiti italijanskega kongresa esperantistov, ki bo potekal v Trstu konec avgusta 2019.

Vrhunec tečaja je bil obisk pri tržaških esperantistih 25. junija 2019 v Trstu, kjer so tečajniki poskušali v praksi pokazati znanje, ki so se ga naučili v treh mesecih učenja esperanta. Z udeleženci smo se strinjali, da se septembra spet vidimo in hkrati k učenju esperanta povabimo tudi nove tečajnike. O tečaju esperanta v Izoli je 8. avgusta poročal tudi lokalni časopis Primorske novice.

V šolskem letu 2019/20 se bo tečaj v Izoli ponovil in nadaljeval. Termin je vsak četrtek ob 14. uri, začetni pogovor je bil 5. septembra. Še je čas za priključitev skupini, saj so vrata odprta za vse zainteresirane od Ankaran do Pirana. **P.G.**



Sodelovali smo na TVU in Paradi učenja

Teden vseživljenjskega učenja (TVU) je promocijska akcija za izobraževanje, ki poteka v Sloveniji že 24 let. Letos je bil ožji termin TVU med 10. in 19. majem, razširjen termin pa je segal do 30. junija. *Parada učenja* kot najvidnejša festivalska prireditev pa je bila v

sredo, 15. maja. Slovenske esperantske organizacije so se na raznih prireditvah vključile v akcijo ter promoviale esperantsko gibanje. Spodaj je zbranih nekaj poročil.

En la Elementa lernejo Simon Jenko

La 14-an de majo 2019 mi prezentis poemeton pri nombroj en la Elementa lernejo Simon Jenko en Kranj (plilongita restado en la lernejo de la 3-a kaj 4-a klasoj).



Ni ellernis nombrojn ĝis dek, ni iom dancis. Ĉiu ricevis bildon de kelkaj fruktoj au legomoj. Oni devis tranombri kaj tralegi nomon de la ajo sur la bildo kaj diri al ni ĉiuj. Tiujn nomojn ili ne ellernis sed havis intereson kaj demandis min kiel oni diras en Esperanto diversajn aliajn vortojn.



Infanoj kun intereso kunlaboris kaj ni amike adiaŭis.
N.R.

Nia stando de la Parado de lernado en Kranj

La 15-an de majo la aranĝo okazis en la municipa halo de Kranj, ĉar ekstere malvarmis kaj pluvis. Estis malmulte da loko kaj brue, sed ni tamen povis paroli pri Esperanto.



Mi ricevis kelkajn retadresojn de preterpasantoj kaj mi promesis informi ilin pri esperanta kurso en aŭtuno.

Mi salutis infanojn el Orehek kie ni amuzis kun poemeto pri mušo. N.R.

Esperanto en la maljunulejo Kranj

Aranĝo »tutviva« lernado daŭris ĝis la fino de junio 2019. Mi proponis prezenti esperanton kaj popolajn kantojn en maljunulejo en Kranj kaj lunde la 3-an de junio ni havis komunan kantadon. Tie oni havas jam propran koruson kaj multaj logantoj kun plezuro kantas preskaŭ ĉiun semajnon.



Por enkonduko mi diris kelkajn vortojn pri d-ro Zamenhof kaj pri certaj slovenaj libroj haveblaj en Esperanto. Mi mencias ankaŭ libron de Fredrik Backman »Babica vas pozdravlja in se opravičuje« kie la sekreta lingvo inter avino kaj nepino estas Esperanto. Poste mi prezantis vortojn de Bela Anjo kaj la esperantigitan slovenan popolan kanton Monteton aĉetos mi. La ĉeestantoj havis ĉion skribi. La gvidantino de la koruso kun agrabla voĉo komencis unue en slovena kaj poste en esperanta lingvo kanti

kaj ni sukcesis bele kanti kune. Ni daūrigis per slovenaj kantoj, kiujn ili ofte kantas.



Por kelkaj estis ĉio stranga, por kelkaj interesa. Mi almenau iom vigligis ilian tagon. N.R.

ED Maribor je izvedlo v MČ Center 15. maja predavanje o propedevtičnih učinkih esperanta. Predstavili so tudi promocijski video in tečaj esperanta v slovenščini. Drugo predavanje je bilo v Slovenj Gradcu v Knjižnici Ksaverja Meška 14. junija. Predstavljena je bila dvojezična knjiga – roman *La sonorilo de Bled / Blejski zvon* in uporaba take knjige za utrjevanje znanja esperanta. Več o tem dogodku si lahko preberete v rubriki *Iz dejavnosti EDM / El la agado de ESM*.

Predviden nastop s stojnico in predstavitvijo esperanta v sklopu Parade učenja v Novem mestu je žal odpadel zaradi bolezni Antona Miheliča.

Bili smo na italijanskem kongresu



V Trstu se je med 24. in 31. avgustom 2019 pretežno v hotelu *Savoia Excelsior Palace* ob obali na Riva del Mandracchio odvijal 86. italijanski esperantski kongres. To je bila zaradi bližine izredna priložnost za udeležbo na prireditvi, ki ima po tradiciji bogat program in je primerno organizirana. Iz Slovenije se nas je udeležilo 7 odraslih (Janez Jug, Ostoj Kristan, Nika Rožej, Milan Škrlj, Rožana Špeh, Peter Grbec in Davorin Jurač) ter 3 otroci (Marta, Luka in Ana Grbec). Vsega je bilo prijavljenih 246 udeležencev iz 28 držav z vseh kontinentov razen Avstralije. Glavna organizatorja sta bila

Itala Esperanto-Federacio (FEI) in Triesta Esperanto-Asocio (TEA). Pomembno vlogo v lokalnem organizacijskem odboru je imel tudi naš član Peter Grbec, ki je vodil delavnico za majhne in velike otroke Lego-Robotiko (trije termini), izlet v Škocjanske jame in je pomagal pri izvedbi katoliške maše v esperantu, ki jo je v cerkvi Beata Vergine del Rosario daroval ljubljanski duhovnik dr. Matjaž Celarc.



Delavnica za lego-robotiko, seveda v esperantu (Foto O.K.)

Kongres je nudil široko izbiro dogodkov. Plenarna otvoritev in zaključek kongresa sta bila le formalni okvir kopice predavanj v sklopih Leonardo, EEU, UEA, Balaž ter posameznih nastopih. Opravljene so bile tudi letne konference italijanskih organov (FEI, učitelji, mladina) ter EEU. Potekala sta tečaja esperanta za začetnike in nadaljevalce, izpiti druge stopnje, delavnica za Lego-robotiko in libroservo vključno s predstavitvami knjižnih novosti.



Tajnik in predsednik ZES na otvoritvi kongresa (Foto: D.J.)

Tudi plesni tečaj in jutranja telovadba či-gong na prostem sta razgibala nekatere udeležence. Kulturni program je poleg maše obsegal še esperantsko dramo, koncert, ples pod zvezdami, nastop pevke šansonov, godalni trio s klasiko, godalni kvartet z glasbo iz belle époque itd. Številni poldnevni celodnevni izleti so bili namenjeni spoznavanju Trsta in okolice, zlasti

Gradeža, Ogleja, Čedadu, Gorice in Škocjanskih jam (prevoznik izletov je bil Nomago iz Kopra). V poštnem muzeju v Trstu je bila postavljena razstava *Trst in esperanto*, ki bo odprta do 28. septembra letos.



Na otvoritvi je spregovoril tudi Renato Corsetti (na sliki še predsednica mladine, predsednik EEU in predsednica FEI). V ozadju 110 let star prapor tržaških esperantistov. (Foto O.K.)

Libroservo je bil shajališče zlasti udeležencev iz Slovenije. Na mizah je bila široka ponudba novejše in starejše literature po ne preveč ugodnih cenah. Zato smo bolj gledali in manj kupovali. Tudi ZES je ponudil tri naslove, ki so povezani s Trstom, Sočo in Krasom (*Doberdo, V zlatem čolnu / En la ora boato ter Pilgrimanto inter ombroj*). Nekaj smo uspeli prodati, nekaj pa smo izmenjali s slovaško založbo *Esperanto Partizanske*. Tako smo pridobili okoli petnajst novih knjig za našo strokovno knjižnico.



Či-gong na pomolu Audace (Foto O.K.)

Podrobnosti o programu, o prijavljenih in predavateljih ter razne druge informacije so na razpolago v tiskanem zborniku kongresa ter na spletišču FEI in na posebni strani <https://kongreso2019.esperanto.it/eo/>, kjer lahko pričakujemo tudi zaključna poročila, sklepe in galerijo slik.

Vsebinsko je bil izredno kvaliteten sklop predavanj EEU, kjer so bili predstavljeni tekoči in končani projekti, ki jih izvaja EEU s pomočjo sredstev EU z raznimi podizvajalcji. Izstopata projekta MLA (=metalingva akcelilo) ter MIME (mobilnost in vključitev v večjezično

Evropo). Projekt MLA je izredno pomemben in poučen pri snovanju tudi slovenske jezikovne politike, saj dokazuje med drugim zgrešenost zgodnjega učenja angleščine v naših osnovnih šolah. Daje dobro osnovo za bolj razumen pristop k strategiji in metodiki poučevanja tujih jezikov (glej članek Zlatka Tišljarja v *Europa bulteno*, julij/avgust 2019, str. 12-17). Projekt MIME daje širše osnove za razumevanje in načrtovanje večjezičnosti ter je dal v pomoč priročnik MIME Vademeicum (z odgovori na 72 zadevnih vprašanj), ki je brezplačno na razpolago v formatu pdf, da pa se naročiti tudi plačljivo papirno kopijo (o projektu in priročniku si oglejte spletišče <https://www.mime-project.org/>). Ti projekti na dolgi rok pripravljajo pogoje za uvedbo esperanta kot delovnega jezika v organih EU in s tem potrebo po prevajanju v in iz esperanta, poučevanju ter učenju esperanta, torej tudi delovna mesta za esperantiste. Od predavanj EEU je bila še posebej prepričljiva analiza jezikovne politike in jezikovne pravičnosti v EU (projekt LAPO), ki jo je z množico podatkov predstavil dr. Michele Gazzola z Univerze Ulster. Rezultati so dosegljivi na spletni strani https://www.michelegazzola.com/lapo_en.html.

Tako EEU in UEA sta v svojih nastopih dala velik podarek sodelovanju esperantistov z UNESCO. Ta mednarodna organizacija, ki je žal v veliki finančni krizi zaradi nepodpore ZDA, je pomemben zaveznik esperanta. Tudi slovenski esperantisti moramo z razgovori z društvji in nacionalnim uradom UNESCO prispevati k uveljavitvi esperanta kot svetovne kulturne dediščine. Pozvani smo tudi bili, da prebiramo in po možnosti naročamo revijo *UNESKO Kuriero*.



Davorin Jurač, Elio Nocent in Agnes Geelen pred hotelom Savoia Excelsior Palace (Foto O.K.)

Še mnogo je vtisov z minulega kongresa v Trstu. Med drugim so nas na kratko obiskali tudi člani esperantske sekcije sekcije KD Slovenj Gradec. Posamezne teme bomo še obravnavali na sestankih društv, pa tudi v našem biltenu bo še kakšen prispevek v prihodnje.

O.K.

Objave v slovenskih medijih

Radio Koper, 6. marca 2019, je objavil reportažo novinarke Tjaše Lotrič o obisku francoskih učencev esperanta pri vrstnikih z OŠ Antona Ukmarja v Kopru. Besedilo in slika lahko najdete s povezavo

<https://www.rtvslo.si/radiokoper/novice/na-koprski-osnovni-soli-antona-ukmarja-s-francoskimi-gosti-v-esperantu/481841>.

Delo, 18. maja 2019, je v rubriki *Mnenja - pisma bralcev* objavilo prispevek Janeza Zadravca z naslovom *Evropa v vlogi janičarja, ki širi angloameriški jezik*. Celoten prispevek si preberite v naši tokratni rubriki *Komentiramo / Ni komentas*. Prispevek, ki je v spletni izdaji opremljen z dvema slikama in citatoma iz prispevka, si lahko ogledate s povezavo <https://www.delo.si/mnenja/pisma/evropa-v-vlogi-janicarja-ki-siri-angloameriški-jezik-185155.html>.

Portal **MojaObčina.si / Bled** je 29. julija poročal v članku z naslovom *Pod Iglico ti povem...* o prikazu gledališča kamišibaj na Bohijski Beli v nastopih za otroke in za odrasle (glejte naš članek v rubriki *Iz dejavnosti EDL / El la egado de ESL*). Posebnost prireditve je bila uporaba lokalnega dialekta in mednarodnega jezika esperanto. Članek spremljajo tri slike z dogodka za otroke.



Primorske novice so 8. avgusta v rubriki *Bralci* sporočajo objavile članek Nike Rožeji *Tečaj esperanta v Izoli uspešno zaključen*. V kratkem poročilu o poteku učenja v preteklem šolskem letu je tudi navedeno, da se bo septembra 2019 tečaj v medgeneracijskem centru v Izoli nadaljeval.

RTV Slovenija – Radio Prvi je 29. avgusta predvajal reportažo tržaške dopisnice Mirjam Muženič o 86. nacionalnem kongresu esperantistov. V oddaji, ki je trajala 4:31 minut so nastopile tudi Nika Rožej, Rožana Špeh, Edvige Ackermann, Michela Lipari itd. Posnetek

oddaje je dosegljiv v arhivu s povezavo <https://4d.rtvslo.si/arhiv/aktualna-tema/174634773>.

Europa Bulteno, julij/avgust 2019 je na straneh 10 in 11 objavil članek Janeza Zadravca v esperantu z naslovom *Komuna deklaro de Štatprezidantoj de EU*. Avtor komentira majsko izjavo predsednikov držav članic pred volitvami v evropski parlament. Vse številke bilten EEU so dostopne na spletni strani <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>.

Anton Mihelič 1949 – 2019



La 19-an de avgusto 2019 forpasis nia amiko kaj samideano Magistro Anton Mihelič – Tone. En čijara aprilo li ankoraŭ vigle preparis la tradician unuamajan prezenton de Esperanto en Brežice kaj aliĝis al la Itala kongreso de Esperanto en Trieste. Sed la terura malsano, la hepatokancero, elširis lin el njaj vicoj. Ripozu en paco, Tone!

Sinceraj kondolencoј al lia edzino kaj samideanino Reneja kaj al ĉiuj familianoj!



La enterigo de liaj cindroj okazis en Mozirje la 22-an de avgusto. Respektoplene adiaŭis de Tone dek esperantistoј el ĉiuj slovenaj E-societoј. **O.K.**

Jarkotizoj SIEL kaj ESL

Letna članarina ZES za individualne člane je 12 € za zaposlene, 6 € za študente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun ZES pri Delavski hranilnici d.d. Ljubljana št. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpišete »char« in namen plačila: »priimek, članarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci vpišete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna članarina ED Ljubljana ostaja na ravni iz prejšnjega leta, to je 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezposelne, upokojence in študente. Članarino ali prostovoljne prispevke lahko plačate na srečanjih in sestankih ali na poslovni račun EDL pri Delavske hranilnici d.d. Ljubljana št. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte še navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. O.K.


Kion oni legos en la sekvanta numero?

Por la numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos fine de novembro 2019, ni antaŭidas raportoj pri interesaj okazaĵoj dum la aŭtunaj monatoj, krome ankaŭ diversajn informojn, anoncojn kaj artikoletojn pri la agado en Esperantujo:

- Eŭropa tago de lingvoj
- alproksimiĝas la 100-jara jubileo de ES Ljubljana
- rememoro pri Peter Zlatnar
- invitoj kaj programoj por la Zamenhofa Tago
- Projekto *Turismo – Esperanto por turistgvidantoj*
- inventaro kaj aranĝo de la faka biblioteko de SIEL
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri via agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. O.K.

Vseslovensko srečanje ob Zamenhofovem dnevnu in dnevnu esperantske knjige



Z veseljem lahko že napovemo, kje bo letošnja osrednja proslava Zamenhofovega dne in dneva esperantske knjige. Esperantska sekcijsa Kulturnega društva Slovenj Gradec je sprejela organizacijo tega dogodka, ki bo v soboto, 14. decembra ob 10. uri v

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Štefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d.d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoj Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacie-informoj-0>

prostorih Knjižnice Ksaverja Meška na Ronkovi 4 v Slovenj Gradcu.

V pripravi je razgiban program, katerega bosta verjetno lahko kronali predstavitvi dveh novih esperantskih edicij. Podrobnosti si boste lahko prebrali v naslednji številki našega biltena in v uradnih vabilih. Že zdaj si rezervirajte čas za srečanje esperantistov in priateljev esperanta na Koroškem. O.K.

Pa še to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...

Ne forĝetu manĝaĵon!

Kiel denove uzi la malnovajn pantranĉaĵojn?

- Bakitaj pantranĉaĵoj!

Pistu ajlon kaj aldonu olivan oleon. Ŝmiru la miksaĵon sur pantranĉaĵojn, surŝutu ilin per pistita rosmareno kaj baku en la bakujo ĉe 180° C proksimume 10 – 15 minutojn, ke ili fariĝos krakaj.

De la Pasko restis ĉokoladaj ovetoj kaj aliaj dolĉaĵoj – Dolĉaj globetoj!

El la restitaj dolĉaĵoj ni faru tre bongustajn globetojn. Ĉokoladon kun iomete da butero fandu. Kukojn, biskvitojn fajne pistu kaj aldonu hakitajn pecetojn de sekigitaj fruktoj kaj iomete da rumo laŭ via gusto. Ĉiujn ingrediencojn bone miksu kaj metu ilin en fridujon. Post unu horo formu globetojn kaj ruligu ilin en ĉokoladeroj aŭ muelitaj nuksoj aŭ kokosfaruno ktp.

Šmiraĵo el restaĵoj: viando, hepato, krenkolbaso ...

Ingredienco: restaĵoj de viando, hepato, krenkolbaso ..., oliva oleo aŭ butero, mola fromaĝo, fritita cepo, ajlo, pipro, salo, petroselo, laŭ via gusto iomete da kajena pipro. Ĉiujn ingrediencojn metu en elektrohakilon kaj haku tiel longe, ke ĝi fariĝos fajna ŝmiraĵo. **Esperanta sekcio Slovenj Gradec**